"malgrava." Alicio povis mem vidi tion, ĉar ŝi staris sufiĉe proksime por rigardi sur la ardezojn. "Tamen tio ne esta grava" ŝi pensis.

En tiu momento la Reĝo subite ordonis "Silenton!"—Li ja en la lastaj minutoj diligente skribis en sia notlibro—kaj nun li legis el tiu libro: "'Regulo Kvardekdua' '*Neniu persono, kies alteco superas unu kilometron, rajtas resti en la juĝejo.*'"

"*Mi* ne havas tian altecon" protestis Alicio.

"Vi havas" diris la Reĝo.

"Preskaŭ *du* kilometrojn" aldonis la Damo.

"Nu, ĉiuokaze mi ne volas iri" diris Alicio. "Plue, tio ne estas vera regulo; vi ja ĵus nun elpensis ĝin."

"Kiel vi kuraĝas tion diri?" diris la Reĝo. "Ne estas en la libro eĉ unu regulo pli malnova!"

"En tiu okazo, ĝi devis esti la unua" kritikis Alicio.

La Reĝo paliĝis kaj tuj fermis la notlibron. "Konsideru la verdikton" la diris al la ĵurintoj per mallaŭta trema voĉo."

La Blanka Kuniklo eksaltis ekscitite.

"Se plaĉas al via Reĝa Moŝto" diris li "ni ankoraŭ havas pli da evidenco por aŭskulti. Oni ĵus trovis tiun ĉi paperon."

"Kion ĝi enhavas?" demandis la Damo.



"Ne ankoraŭ mi malfermis
Kuniklo; "sed ĝi ŝajnas esti lete
la juĝato al—al iu."

"Nepre al *iu*" diris la Reĝo "
estas skribita al Neniu, kaj ord
skribas al *li*."

"Al kiu ĝi estas adresita?"
ĵurinto.

"Ĝi tute ne estas adresita" di
Kuniklo. "Fakte, nenio estas s
eksteraĵo."

Dirante tion li malfaldis la
aldonis :—

"Post ĉio dirita, ĝi ne estas le
versaĵoj."

"Ĉu ili estas skribitaj per la m
juĝato?" demandis alia ĵurinto.

"Ne" respondis la Blanka Ku
la plej nekomprenebla afero."

Ĉe tio la mienoj de la tuta ĵurin
plenan konfuziĝon.

"Do, li nepre imitis *ies* mansk
Reĝo. (La mienoj de la ĵurintoj

"Se plaĉas al via Reĝa M
juĝato mem "mi ne skribis ĝin, k
pruvi ke mi skribis ĝin. Ĝi ja
skribita ĉe la fino."

"Se vi ne subskribis" diris la
pligravigas la ofendon. Vi nep

LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURST